I. F. E. A.

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A."; e alla ITALA ESPERANTO-FEDERACIO "F.E.I." (Ente Morale D.P.R. 28-6-1956 nº 1720).
Sede Centrale: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA

INFORMA BULTENO = ITALA FERVOJISTO

Redazione: Via Donato Creti, nº 61 BOLOGNA (Italia)

Nº 11 - 12 Novembro kaj Decembro 1963-a 13-a Jaro

## BONDEZIROJ

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO=ITALA FERVOJISTO", FRATE BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO.

NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

## 49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

### DEN HAAG - Nederlando - 1 - 8 aŭgusto 1964

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE ŜIA MOŜTO JULIANA, REĜINO DE NEDERLANDO.
Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Infana Kongreseto: La aliĝo al la 9-a Internacia Infana Kongreseto estas malfermita. En ĝi povas partopreni nur infanoj de 6 ĝis 13 jaroj kun bona lingvoscio. La kotizo por la tuta kongresa semajno estas 42 ned.Gld. Du aŭ pluraj infanoj de la sama familio pagas po 37 ned.gld.
Glumarko: Aperis la Kongresa Glumarko! Ĝi estas aĉetebla ĉe nia Sekretario. La prezo estas 0,40 ned.gld. por ĉiu folio (10 glumarkoj).
Foto Konkurso: Ankaŭ okaze de la 49-a U.K. okazos konkurso por foto-amatoroj. Por la gajnintoj de la konkurso estas antaŭviditaj altaj premioj. Detaloj aperos en venontaj komunikoj.
Statistiko: Je la 15-a de oktobro aliĝis entute 563 personoj el 27 landoj (pasintjare 180 el 25 landoj). G.G. Pompilio-Konstanta Kongresa Sekreta.

## ORA MEDALO AL JUBILEANTA PIONIRO

La itala pioniro Prof. Corrado Grazzini, jubileanta ĉijare sian okdekjaraĝon, retiriĝis de la gvidaj ŝarĝoj de Itala Instituto de Esperanto, kiun li direktis dum 40 jaroj, kaj estas elektita kiel Honora Ĝenerala Direktoro de la Instituto. Pasintan monaton la membroj de la Instituto kaj reprezentantoj de pluraj grupoj kunvenis en Firenze por festi Prof-ron Grazzini, gratuli kaj danki lin pro lia laboro. Prof. Carlo Agostini, nova ĝenerala Direktoro de la Instituto, per tre aplaŭdata parolado skizis la biografion de la jubileanto kaj transdonis al li oran honormedalon. Prof. C. Grazzini estas esperantisto de 1905. (de Heroldo de Esperanto)

AUGURI AUGURI AUGURI

ADERITE ALL'ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI " I. F. E. A. "

versate subito le quote sociali 1964

## MEMORAĴOJ DE NIA 15-a I.F.E.F.-KONGRESO

Dum la 15-a IFEF-Kongreso en Stoke-on-Trent, mi havis la honoron kaj plezuron koni la eminentan Esperantiston Sidney P.Hill, Urbestron de Nottingham, kiu alparolis la kongresanojn dum la Solena Malfermo kaj estis inter ni en la kongresa foto. Nun mi memoras lin per la jena sciigo kiun mi legis en la "Informilo de Internacia Esperanto Muzeo en Wien":
La Urbestro de Vieno kaj la Urbestro de Nottingham. Akcepto ĉe la Urbestro de Wien okazis por la partoprenantoj en la kongreso por trafikentreprenoj, en kiu ankaŭ partoprenis Alderman Sidney P.Hill, Urbestro de Nottingham; kiu surhavis la Esperanto-stelon. Kiam li venis al la urbestro s-ano Franz Jonas, tiu vidis la stelon kaj tuj alparolis la urbestron el Nottingham je la miro de aliaj en flua Esperanto, en kiu la alia samflue respondis. Per tio urbestro Jonas montris al la kongresanoj, ke la kongreslingvo povus esti Esperanto en la intereso de ĉiuj.
(Mi memoras ke multfoje Fervojistoj Esperantistoj havis la honoron esti akceptitaj de Urbestro Jonas).

## VIVO DE LA GRUPOJ

BOLOGNA- Dimanĉon la 17-an de novembro en Bologna okazis grava renkontiĝo de esperantistoj vere ĝojga por ni fervojistoj ĉar la manifestacio disvolviĝis en "Salone degli Specchi" (Salono de la Speguloj) de "Dopolavoro Ferroviario" kun la ĉeesto de ĝia Prezidanto S-ro Grazia. Plue oni rimarkis inter la premiitoj tri niaj membroj: ili partoprenis pasintjare kurson organizitan de "Dopolavoro Ferroviario" en kunlaboro kun I.F.E.A. ĉe la Profesia lernejo en la Centra Stacidomo de Bologna. Du ĝajnis la unuan premion kaj la alia la duan.

La tago estis vere renkontiĝa ĉar krom la Bolognaj Esperantistoj oni povis vidi imponan grupon de fraŭlinoj (tre ĉarmaj) de Parma, grupoj de Mirandola, de Modena, de Ferrara kaj de S. Arcangelo di Romagna.

Dum la disdonado de la diplomoj kaj premioj al la lernantoj de la lastaj kursoj, Lia Moŝto Advokato Bagnulo, nia Honora Membro, parolis pri la 50-a datreveno de la Bologna katedro de Esperanto, kaj Prof. Agostini, denove inter ni, prezentis al la ne esperantistoj kaj al la regiona radio-stacio la "Dia Komedio"-n de Dante esperante tradukitan.

Posttagmeze, fare de la Junulara Sekcio, en la kadro de la intergrupaj rilatoj, okazis dancfesto kun la taŭga konturo de rostiĝitaj kaŝtanoj kaj de bolognaj specialaj kukoj, ĉio malsekiĝita pere de la flava suko de l' vinbero. La tago finis kun la promeso de la gastoj, ke baldaŭ denove ĉiuj kune renkontiĝos.

Jam antaŭ kelkaj semajnoj ekkomencis gvidata de S-ro Righi kaj Prof-ro Chicca la du kursoj ke la Junulara Sekcio organizis por enkonduki Esperanton inter la gejunuloj kaj doni al ili, en tiu ĉi tempo de malamo kaj suspekto, validan ilon al la kompreno kaj tolero. En tiuj kursoj atendas la ĝojon de la Esperantoscio 48 gejunuloj el ĉiuj vivkondiĉoj.

Merkredon vespere, la 26-an de novembro okazis inaŭguro de la kurso organizita de "Dopolavoro Ferroviario" de Bologna en kunlaboro kun "Itala Fervojista Esperanto-Asocio", en la Profesia lernejo de Ŝtatfervojoj en la Centra Stacidomo de Bologna. Ĉeestis multaj fervojistoj esperantistoj de Bologna, krom la 20 lernantoj dividitaj en du kursoj, unua- kaj duagrada.

S-ro Gimelli, intence komisiita, prezentis mallonge la salutojn kaj bondezirojn de la Prezidanto de "Dopolavoro Ferroviario" kiu lastmomente ne povis partopreni la manifestacion.

Post enkondukaj vortoj de Kav.Zacconi, Prezidanto de I.F.E.A., la kursgvidantoj, S-ro Gianluigi Gimelli por la unuagrada, kaj S-ino Delvina Gimelli por la duagrada, ekkomencis la lecionojn.

PORTATE SEMPRE LA STELLA VERDE

## N O V A Ĵ O   E L   R O M O

Notindan laboron faris P.Jacobitti kun siaj helpantoj: Terrazzani (membrino de nia Asocio) kaj Canevari, sendante latinan porinforman leteron ennome de I.K.U.E. al la episkoparo kunveninta en Romon por la Koncilo. La letero estis subskribita de la IKUE-Prezidanto, P.Beckers kaj de la Sekretario, P.Flammer. P.Jacobitti vizitis persone diversajn kardinalojn kaj episkopojn esperantistajn, disdonante al ili ankaŭ ekzempleron de la encikliko "Sur Tera Paco" (esperante tradukita), de Nova Civito, C.E.C.R.-cirkuleron, ktp. Ĉiuj havis tre afablajn dankajn vortojn. (de Cecr-bulteno)

## N O V A J   L I B R O J

LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri. Traduko de Giovanni Peterlongo paralele kun la itala teksto. Eldonis Edizione S.I.E.I. Milano 1963. 709 paĝoj 28x21 cm., kun antaŭparoloj de Bruno Migliorini, Paolo Peterlongo, Piero Bargellini kaj Gaston Waringhien, kun komentariaj notoj, listo de variantoj, indekso de propraj nomoj kaj 89 tutpaĝaj reproduktaĵoj de la originalaj ilustraĵoj de Sandro Botticelli. Prezo tole bindita kun plasta ŝirmilo kaj kartona skatolo: 36 ned.gld. (144 steloj).

## CENTJARA EKZISTADO DE ENURBA FERVOJO

En la stacidomo de Baker Street en Londono fiksiĝis plato por memorigi, ke la unua subtera fervojo en la mondo fariĝis alirebla por vojaĝantoj la 10-an de januaro 1863. La trajno cirkuladis inter Bishop Road, Paddington kaj Farrington Street, en distanco de ĉirkaŭ 6,5 km. Nuntempe la Londona subtera fervojo posedas 271 stacidomojn kaj relreton de pli ol 400 km.; ĝi transportadas 675 milionojn da vojaĝantoj pojare. (Unesco-Heroldo de E.)

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia)
La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). Ondlongoj: m. 30,90 (Mc/s.9,71); m. 41,24 (Mc/s.7,27); m. 50,34 (Mc/s.5,96).
Prelegantoj: marde kaj merkrede: S-ro Luigi Minnaja - vendrede: Prof.D-ro Vincenzo Musella. - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.
DISSENDOJ EN ESPERANTO, JARO 1964-a - JANUARO 1964-a: vendredon la 3-an: Inter Novjaro kaj Epifanio - mardon la 7-an: Tra la literaturo - vendredon la 10-an: Ettore Romagnoli 25 jarojn post la morto - mardon la 14-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 17-an: Capri - mardon la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 24-an: Italaj operkantistinoj: B. kaj C. Marchisio - mardon la 28-an: Leterkesto - vendredon la 31-an: Italaj humanistoj: Lorenzo il Magnifico.
FEBRUARO 1964-a: mardon la 4-an: Tra la literaturo - vendredon la 7-an: Karnavalo en Italujo - mardon la 11-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 14-an: Romaj Kasteloj: Castel Gandolfo - mardon la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 21-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: Cervantes - mardon la 25-an: Leterkesto - vendredon la 28-an: Grandaj italaj komponistoj: G.Donizetti.
Al ĉiuj niaj aŭskultantoj: FELICAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON !

La Fakestro: L. Minnaja

ICI LA SUISSE - Svisa Radiodissendo- Eŭropa Programo de la 3-a de novembro 1963-a.ĝis la 2-a de majo 1964-a - Dissendoj en Esperanto. Mallongaj ondoj: m. 48,66 (Kc. 6165) kaj m. 31,46 (Kc. 9535).
Lundon: je la h.13,10 (M.E.T.): Esperanto (A.Baur) - Merkredon: je la h. 13,10 (M.E.T.): Esperanto (C.Gacond) - Ĵaŭdon: je la h. 22,15 (M.E.T.):Esperanto (A.Baur) - Sabaton: je la h.22,15 (M.E.T.): Esperanto (C.Gacond).
PAROLAS VARSOVIO - Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la h.16,30 ĝis la h.17,00 laŭ la mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur jenaj ondoj: m.50,42;48,90;42,11;41,99;41,18;31,45;31,01 kaj m.200.